

29an ORDINARA TEMPO – 22an de oktobro 2017

PAGU AL LA IMPERIESTRO TION, KIO APARTENAS AL LI; SED DONU AL DIO TION, KIO APARTENAS AL DIO.

Komento al evangelio d p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 22, 15-21

En tiu tempo la fariseoj konsiliĝis por trovi manieron faligi Jesuon per insidaj demandoj. Poste ili sendis kelkajn el siaj disĉiploj kun aliaj el la partio de Herodo, kiuj diris al Li: «Majstro, ni scias, ke Vi estas ĉiam sincera, instruas vere la volon de Dio, kaj ne zorgas pri la juĝoj de la aliaj, ĉar vi ne favoras iun pro lia aspekto. Pro tio ni petas vian opinion: Ĉu konvenas pagi tributon al Cezaro aŭ ne?» Sed Jesuo, kiu konis ilian malicon, respondis: «Kial vi Min provas, hipokrituloj? Montru al Mi la moneron necesan por pagi tributon» Ili alportis al Li denaron kaj Jesuo demandis: «Al kiu rilatas ĉi tiu bildo kaj surskribo?». Ili respondis: «Al Cezaro». Tiam Jesuo diris al ili: Redonu do al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro; sed donu al Dio tion, kio apartenas al Dio».

Post la serio da atakparoloj per kiuj Jesuo akuzis la spiritajn estrojn de la popolo esti ŝtelistoj kaj murdistoj – ŝtelistoj ĉar ili alproprigis al si la popolon kaj murdistoj ĉar ili uzis perforton – estas nun kontraŭatako flanke de tiuj ĉi estroj, kiuj tamen havas problemon. Jesuo estas sekvata de granda homamaso, tial oni devas lin senestimigi.

La evangelio kiun ni legas, je ĉapitro 22 de Mateo, versikloj 15-21, estas la unua el serio da atakoj per kiuj la religiaj estroj, la spiritaj estroj klopodos senestimigi Jesuon, preparos insidojn por lin misfamigi kaj senestimigi antaŭ la amaso.

Ni legu. En tiu tempo. La 'en tiu tempo' kunligas tiun epizodon kun la denunco kiun Jesuo faris per la parabolo de la invititoj al la nupto kiuj rifuzis tiun inviton pro intereso. La profito estas tiu kiu determinas la agadon de la religiaj estroj. En tiu tempo la fariseoj konsiliĝis ... tiu esprimo en la evangelioj ĉiam havas negativan signifon pri komploto kontraŭ Jesuo... por trovi manieron faligi Jesuon per insidaj demandoj.

Nun do estas vico da insidoj kiujn oni preparis por Jesuo, sed en kiujn Jesuo ne enfalos preparante siavice insidojn por siaj akuzantoj. Poste ili sendis kelkajn el siaj disĉiploj kaj ĉe tie estas surprizo, kun aliaj el la partio de

Herodo. Fariseoj kaj Herodanoj malamis sin reciproke ĉar la Herodanoj estas tiuj de la partio de Herodo, kiu estis puporeĝo tien metita de la romianoj, kaj la fariseoj malamis tiun reĝon.

Inter ili estis granda malamikeco, sed nun ili havas komunan danĝeron. Jesuo estas danĝera kaj por la fariseoj kaj por la herodanoj, tiam ili kuniĝas en klanon por lin elimini. Ili diris al Li: „Majstro,... atentu tiun ĉi kvalifikon, en la evangelio de Mateo ĝi estas ĉiam eldirata de la malamikoj de Jesuo aŭ de tiuj kiuj estas al li malfavoraj, sed ĝi estas parto de tiu kuria lingvaĵo utiligata por mildigi tion kion ili volas eldiri. “Ni scias, ke Vi estas ĉiam sincera, instruas vere la volon de Dio”.

Tiu aserto veras, ili do agnoskas ke Jesuo instruas la vorton de Dio laŭ la vero, sed kial? Vi ne zorgas pri la juĝoj de la aliaj, ĉar vi ne favoras iun pro lia aspekto. La konstrasta ago estas ke ilin, male, Jesuo akuzis ke ĉio kion ili faras estas por esti admirataj, jen la diferenco.

Kiam oni metas la valoron de la homo kiel absolutan principon kiu reguligas propran ekziston oni atentigas neniun, oni tute ne zorgas pri la opinio de la personoj. Kaj jen la insido, Pro tio ni petas vian opinion: la verbo estas imperativa, ne temas pri peto, sed pri trudo, Ĉu konvenas pagi tributon al Cezaro aŭ ne?” Kio estas la tributo al Cezaro?

Ekde kiam estis nomumita por Judujo romia prokuroro en la VI p. K., estis imposto por ĉiuj, viroj kaj virinoj, 12 ĝis 65 jaraĝaj. La demando estas tendenca. Kial? Ĉar ĝuste pro la pago de tiu imposto okazis pluraj tumultoj. Sufiĉas pensi pri tiu de Judaso el Galileo kiu ribelis kontraŭ tiu imposto. Nu la demando estas insido, ĉar ili demandas al li ĉu licas aŭ ne pagi la imposton al Cezaro, ni ne forgesu ke ni troviĝas ene de la templo-areo, kiel ajn Jesuo respondas, li sin damaĝas.

Ĉar se Jesuo diras: “Jes, licas pagi la imposton al Cezaro” li kontraŭas la leĝon per kiu la ununura Sinjoro de la popolo, la ununura tiel rekonata, estas Dio. Se male li diras “Ne, ni ne pagu” jen ke li estas revoluciulo, ribelulo, kiel estis Judaso el Galileo. Ni estas ene de la templo, tie estas gvardioj kaj Jesuo povas tuj esti arestata.

Jesuo do, kiel ajn li respondos, sin damaĝos, jen se li sin deklaras favora, jen se li sin deklaras kontraŭa al pago de tiu imposto. Kaj jen, al fariseoj kaj herodanoj kiuj preparis insidon al Jesuo, li siavice preparas al ili insidon. Jesuo abrupte diras: “Montru al Mi la moneron necesan por pagi tributon.” Ili alportis al Li denaron. Sed en la templo estis severe malpermesite porti romiajn monerojn, ĉar pro la leĝo eldirita en la libro de la Readmono, en la ordonoj, oni malpermesas reprodukti kiun ajn homan bildon.

Pro tio en la plej sanktejo de Jerusalemo, la templo, estis tute malpermesite enporti monerojn, romiajn monerojn, kiuj surhavis homajn bildojn. Ĉe la enirejo de la templo estis monŝanĝistoj kiuj ŝanĝis la romiajn monerojn per moneroj ellasataj en la templo. Sed la profito – tio estas la

denunco kiun la evangeliisto estas faranta – estas la vera Dio de tiuj farseoj. Ili, kiuj estas obsedataj de la ideo de puro kaj malpuro, kiuj estas skrupulemaj, kiam temas pri mono ne perdiĝas en subtilaĵoj.

En la templo, en la plej sankta ejo, ili enportas moneron kiu, antaŭ la religio estas konsiderata malpura. Sed pro la profito, pro la avantaĝo, ili neglektas ĉion tion. Jen do la insido de Jesuo kiam ili naive donas al li denaron. Kaj Jesuo demandis: „Al kiu rilatas ĉi tiu bildo kaj surskribo?“. Ili respondis “Al Cezaro”. Fakte la romia denaro surhavis unuflanke la bildon de Tiberio kun la skribo “Cezaro filo de la dia Aŭgusto, plej alta pastro” kaj aliflanke estis la patrino de la imperiestro bildigata kiel la diino de la paco.

Ajnakaze temis pri du homaj bildoj. Ili respondis “Al Cezaro”. Tiam Jesuo diris al ili... Ili demandis ĉu licas pagi aŭ ne, Jesuo ne respondas ĉu licas aŭ ne pagi, li utiligas alian verbon, kiu estas “redoni”. „Redonu do al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro. Se vi ne volas lian regadon vi ne devas utiligi liajn beneficojn, pro kio tiu denaro ne estas via, ĝin redonu al Cezaro.

Sed, kaj estas tio kion la evangeliisto volas celi, sed donu al Dio tion, kio apartenas al Dio“. Kion ili devas redoni al Dio kaj kio estas de Dio? Jesuo en la parabolo de la vitkulturistoj murdistoj utiligis la religiajn estrojn kaj la spiritajn estrojn kiuj pro intereso alpropriligis al si la vitejon de la Sinjoro, kiuj metiĝis inter Dio kaj la popolo, trudante siajn tradiciojn, siajn leĝojn, kaŝante kaj obskurigante la amon de Dio por lia popolo. Oni devas do malagnoski unuflanke la regadon de Cezaro, sed redoni tion de Dio kio estis uzurpata de la fariseoj.

Aŭdinte tiujn vortojn, komentas la evangeliisto, ili miris, surpriziĝis, kaj, lin lasante, foriris. Ili foriras por poste reveni, fakte pli poste ili rekomencos per unu el ili, per fakulo, per leĝodoktoro. Kaj ĉi tiu estas nur la serio de la insidoj al Jesuo kiujn faros fariseoj, herodanoj, sadukeoj kaj leĝodoktoroj.